

La instancoj de la Eŭropa Komunumo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 617-97-1, 1982 septembro 09 kaj 11
[http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-97/SRI-1982-97-1-617-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-
instancoj-de-la-Europa-Komunumo.mp3](http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-97/SRI-1982-97-1-617-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-
instancoj-de-la-Europa-Komunumo.mp3)

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia

La du pasintajn elsendojn ni dediĉis al la Eŭropa Komunumo, kies membro ne estas Svislando. Ni unue vidis, kiel formiĝis tiu ĉi komunumo sur la bazo de tri traktatoj subskribitaj en Parizo en 1951 kaj en Romo en 1957 kaj kiajn precizajn celojn ĝi havas. Ni konstatis, ke la nombro de la membroŝtatoj kreskis de 6 al 10, kaj ke la Eŭropa Komunumo, pere de sia demokrata funkciado, estas unu el la pacigaj elementoj en okcidenta Eŭropo. Ni dediĉos la hodiaŭan elsendon al raporto pri la funkciado de la ĉefaj instancoj de tiu Eŭropa Komunumo, ĉerpante tiujn ĉi klarigojn el speciala numero de la organo MONATA CIRKULERO de Kultura Centro Esperantista. Tiun ĉi dokumenton vi povas peti tra la kanalo de Svisa Radio Internacia.

A.- Supraĵa rigardo al la instancoj de la Eŭropa Komunumo povus gvidi al konkludo, ke la Komisiono estas la plenuma povo de la Komunumo, kiu korespondas al la leĝdona Konsilio kaj al la jurisdikcia Kortumo, do ke estas tri povoj laŭ la klasika demokrata sistemo.

Cl.- Fakte la Komisiono de la Eŭropa Komunumo estas multe pli ol nura ekzekutivo. Ĝi ja havas plenumajn rolojn, sed ankaŭ ĝi agas kiel esprimanto de la Komunuma intereso ĉe la Konsilio, kiu grupigas la ministrojn de la membroŝtatoj kaj fakajn ambasadorojn. La Komisiono samtempe agas kiel protektanto de la traktatoj, kiam la Konsilio emus malrespekti ilin, kaj kiel motoro de la Komunuma politiko, farante proponojn al la Konsilio. Tiu multflanka rolo postulas certan klarigon.

A.- Ni unue ekzameniu la ekzekutivan rolon de la Komisiono de la Eŭropa Komunumo. La traktatoj de Parizo kaj Romo donas al la Komisiono sufiĉe grandan povon, kaj por certaj kazoj ĝi ricevis eĉ kromajn povojn. Ĝiaj ĉefaj taskoj estas:

Cl.- Preparo de decidoj kaj reguloj, kie la traktatoj permesas, ke la Komisiono faru tiajn regulojn. Tio validas speciale por karbo, ŝtalo kaj komuna agrikultura politiko.

A.- Apliko de la traktatoj en precizaj kazoj. Kelkfoje la Komisiono kontrolas kaj supervidas, ekzemple koncerne la konkurencon politikon, aliffoje la Komisiono negocas kun entreprenoj ekzemple pri la uzo de karbo, ŝtalo, atommaterio, aŭ ĝi administras la fondusojn de la Komunumo, ekzemple la Socian Fonduson, la Evoluan Fonduson, la Fonduson por Agrikultura Gvido kaj Garantio, la Regionan fonduson, kaj fine la Komisiono direktas programojn de teknika esploro kaj evoluo.

Cl.- Pro la fakto ke la Komisiono ricevis tiamaniere certan decidpovon, oni ankaŭ volis zorgi, ke ĝiaj decidoj korespondu al la deziroj kaj politikaj linioj en la Membroŝtatoj. Tial ekzistas grupo da administraj komitatoj por konsili la Komisionon. Tiuj komitatoj konsistas el reprezentantoj de la Membroŝtataj registaroj, kaj ili donas sian opinion pri la proponoj de la Komisiono.

A.- Estas do tre kompleksa sistemo, kiu pruvas, ke la Eŭropa Komunumo naskiĝis laŭ la bezonoj de la realeco, kaj neniel el utopia cerbumaĵo. El tio ĝia kapablo adaptiĝi al la realaĵoj. Ĝi estas evolu-kapabla.

Cl.- Ni raportis pri la decidpova rolo de la Komisiono, ni nun duri kelkajn vortojn pri ĝia kontrolo rolo. La Komisiono estas la protektanto de la Traktatoj. Tie ĉi temas pri la supervido de la traktatoj kaj de la decidoj faritaj sub ilia aŭtoritato. Se ekzemple Membroŝtato malsekvas la kondiĉojn de unu el la traktatoj, la Komisiono povas tion eltrovi ĉu pro enketoj fare de propraj oficistoj, ĉu pro plendoj fare de aliaj Membroŝtatoj aŭ de unuopuloj. Kaj ĝi petas klarigon de la koncerna Membroŝtato. Se la klarigo estas iel malkontentiga, la Komisiono rajtas ekprocesi kontraŭ tiu Membroŝtato ĉe la Eŭropa Kortumo, kies decido ligas la Membroŝtatojn kaj la instancojn de la Eŭropa Komunumo. En 1978, ekzemple, okazis 15 tiaj procesoj kontraŭ malobeemaj Membroŝtatoj.

A.- Fine, la Komisiono de la Eŭropa Komunumo estas la motoro de la Komunuma politiko. Tiu ĉi estas eble la plej grava rolo de la Komisiono.

Cl.- La Traktato de Romo, tio estas tiu pri la ekonomia komunumo (la Komuna Merkato), donis kadron pri politikaj decidoj, kaj ĝi lasis al la instancoj de la Komunumo la taskon efektivigi tiun politikon. La ekonomia unuiĝo estas nenie detale priskribita, kaj por realigi ĝin, la Komisiono, kiel motoro de la Komunumo, rajtas proponi al la Konsilio iujn ajn metodojn kaj rimedojn por disvolvi kaj evoluigi la Komunumon. Tio ĉi povas fariĝi sen nova traktato.

A.- La Komisiono estas do tre potenca, ĝi estas kiel ni vidis, samtempe ekzekutiva organo de la Eŭropa Komunumo, sed ĝi ankaŭ havas decidpovon kun la Konsilio kaj kontrolpovon kun la Kortumo.

Cl.- Tiu Komisiono konsistas el 14 komisionanoj, po unu aŭ du por Membroŝtato, laŭ ilia graveco. Kaj ĉiu komisionano havas apartan respondecon. Nomitaj de la Membroŝtataj registaroj, ili devas kvazaŭ lasi sian naciecon en la vestiblo kaj resti sendependaj de iu nacia politiko. Ilia ofico daŭras dum kvar jaroj kaj estas renovigebla.

A.- Dum tiu periodo ili estas forigeblaj nur se la Eŭropa Parlamento akceptas rezolucion por maldungi ĉiujn komisionanojn samtempe. Ĝis nun tio neniam okazis.

Cl.- Tiel ni konstatas, ke Komisiono estas superŝtata instanco. Kaj ĝi estas sufiĉe malgranda, por povi bone plenumi sian kompleksan funkcion: konstrui demokratan Eŭropon.

A.- Ni vidis, ke la Eŭropa Parlamento povus maldungi ĉiujn tiujn komisionanojn samtempe. Estas do la momento iom raporti pri la konsisto de tiu Parlamento.

C1.- La Eŭropa Parlamento konsistas el 434 reprezentantoj el la Membroŝtatoj, laŭ jena divido, kiu respondas al la ekonomia kaj loĝantara graveco de la membroŝtatoj:

A.- Belgio havas 24 reprezentantojn, Danlando 16, Germanio 81, Grekio 24, Francio 81, Irlando 15, Italio 81, Luksemburgio 6, Nederlando 25 kaj Britio 81.

Cl.- Ne estas naciaj frakcioj en la Parlamento, sed politikaj grupoj je eŭropa nivelo.

A.- La Parlamento kunvenas 12-foje jare, kutime en Strasburgo, kie ĝi uzas la saman kunvenejon kiel la Konsilio de Eŭropo, la Eŭropan Palacon.

Cl.- Inter la 12 sesioj de la Parlamento kunvenas en Bruselo la 15 komitatoj, kiuj preparas la laboron de la sesioj.

A.- Estas tre grave noti, ke kompare kun la Parlamentoj de la Membroŝtatoj kaj multaj aliaj landoj, kie Parlamento ludas leĝdonan rolon, la Eŭropa Parlamento havas aliajn taskojn.

Cl.- Ĝia ĉefa tasko eatas supervidi la agojn de la Komisiono por certiĝi, ke tiuj korespondas al la interesoj de la Komunumo. Ĝiaj komitatoj ekzamenas detale la proponojn prezentotajn de la Komisiono al la Konsilio. La Parlamento rajtas skribi aŭ parole peti informojn de ambaŭ instancoj. Ĝi ankaŭ havas buĝetajn povojn pri administraj kaj aliaj elspezoj rilate al komunuma politiko, ĝi rajtas proponi ŝanĝojn en elspezprojektoj, kiujn ĝi ne povas mem decidi, kaj laste ĝi rajtas malakcepti la tutan buĝeton de la Eŭropa Komunumo.

A.- La venontan semajnon ni raportos pri la Eŭropa Kortumo kaj pri la laboro de la Eŭropa Komunumo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*